

Cena numeru 50 gr.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantista Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.

Jarabono: en Polujo 6 zloty, eksterlande samvaloro de 6 orfrankoj.

La Redakcio ne resendas manuskriptojn; konservu kopion.

Redaktoro kaj eldonanto:

STANISLAW KAROLCZYK

PROTEKTOROJ:

Prof. Dr. Odo Hajwid, Jan Kostecki, Dr. Emiljan Loth.

SUBTENANTOJ:

Ing. Roman Iwo Dobrzański, Antoni St. Stankiewicz.

HELPANTOJ:

Eugenie F. Cense, Dr. Ignacy Dziedzic.

ENHAVO:

MIECZYSLAW TROCHIMOWSKI: 1925. — S. GRENKAMP-KORNFELD: Wladyslaw Stanislaw Reymont. — LEO TURNO: Pri la esperanta gazetara lingvo. S. A. KOWICZ: Niaj kongresaj intervjuoj. — M. TROCHIMOWSKI: Zamenhofs tago — Scienco, — Ruch esperancki w Polsce. — Pola esperanta movado. — E. F. C.: Bibliografio. — Diversajoj. — Avizoj. — Konkurso.

JARO XX.

Warszawa, Januaro.

Nr. 9 (119).

Kunvenoĵ de Pola Esperanto-Asocio

Warszawa, Królewska 19.

Ĉiamekrede je 8 ĝis 10 h. vespere. La kancelario kaj biblioteko funkcias ĉiamekrede kaj sabate de 7.30 ĝis 9 h. vespere.

Niaj kunlaborantoj:

Leo Belmont (Warszawa), Stanisław Braun (Łódź), Janina Barkathówna (Warszawa), Eugenie Cense (Warszawa), D-ro Antoni Czabryński (Warszawa), D-ro Ignacy Dziedzie (Toruń), Jan Ferencowicz (Warszawa), Helena Hempel (Lwów), Bronisław Kahl (Kraków), Jan Kosteki (Paris), Mieczysław Kbas (Warszawa), Antoni Lange (Warszawa), D-ro Jan Mędrkiewicz (Lublin), Józef Orzech (Tarnów), Włodzimierz Pfeifer (Łódź), Antoni S. Stanekiewicz (Warszawa), Leo Tarno (Kraków).

Niaj subtenantoj:

Nia gazeto, privata eldonaĵo de la Redaktoro, bezonas la bonvolan materialan helpon de tiaj poloj esperantistoj por kiaj ĝia progreso estas kara kaj kies cirkonstancoj tion permesas. Ja pli da subtenantoj anonciĝos des pli enhavoriĉa, luksa kaj pli efika estos la „Pola Esperantisto“.

unika esperanta revuo por poloj.

La nomojn de la subtenantoj ni ĉiam presas sur la antaŭa paĝo de la kovrilo.

Fariĝi Protektoro, Subtenanto aŭ Helpanto de „Pola Esperantisto“ povas ĉia persono, kia enpagos monate po Zł. 80, 15 aŭ 5.

Subtenantoj ricevos sen plia pago 2 ekzemplerojn de la gazeto.

Eldonó de la

„Pola Esperantisto“

Włdek 19, Warszawa.

Abonu kaj abonigu por Via gazeto!

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XX.

Warszawa, Januaro.

Nr. 1 (119).

Organizantoj de la Sepa en Wilno.



**Prof. ĉe. Universitato en Wilno
Jan Maszyński, Prezidanto de
L. K. K.**



**Prokuroro Roman Sakówlec,
Ĝen. sekretario de L. K. K.**

**Laŭ propono de la VI Kongreso en Warszawa, estraro de
la P. E. A.-Grupo en Wilno konsentis aranĝi la VII Kongreson
en sia urbo (detala komuniko en la sekvonta numero).**

1925.

Esperanto przez długi czas było sprawą prywatną pewnej kategorii ludzi, którzy starali się wyprowadzić go na międzynarodową arenę. Ale niestety wszelkie ministerja, urzędy, szkoły nie miały zaufania do „t. zw. języka Esperanto“! Zdało im się, że nowy eksperyment kilku zapaleńszych entuzjastów niedługo zostanie usunięty w cień przez pojawienie się nowej próby i tak pójdzie dalej *ad infinitum*, jak myśleli najwięksi realiści.

Kilkadziesiąt lat przetworzyły „sztuczny żargon“ w język żywy, który stał się poważną dźwignią w wespółzyciu, jeśli nie ludów, to w każdym razie wielkiej gromady ludzi.

Te kilkadziesiąt lat istnienia i pracy Esperanta przekonały jego przeciwników, że nie mają do czynienia z bańką mydlaną, lecz z czemś stałym, niewzruszonym, jak opoka.

Rok 1924 zapisał się złotymi zgłoskami w dziejach Esperanta. Oto Liga Narodów na swem piątym posiedzeniu postanowiła zwrócić się do państw-członków z propozycją nadania językowi Esperanto ulgowej taryfy radiofonicznej, jako językowi jasnemu, obok innych dotąd używanych.

To postanowienie wyprowadziło Esperanto na szeroki świat międzynarodowy.

Niedługo potem Międzynarodowa Konferencja państw-członków Powszechnej Unji Telegraficznej według polecenia Ligi Narodów uzupełniła art. 7-my międzynarodowego Regulaminu telegraficznego słowami: „używanie Esperanta jest dopuszczalne“.

Dziwnem wydawało się nieco, że fakt poprzedni nader ochoczo podchwyciła prasa esperancka, podniosła go do godności, może mu nie należnej, ale dziwnem wydawało się dla ludzi krótkowzrocznych. Prasa esperancka zrozumiała, że zrazu mało znaczny fakt, jak wybuch wulkanu, pociągnie za sobą dalsze wydarzenia podobne mu, pokrewne.

I proszę patrzeć co się dzieje.

Już w dwa lata później Międzynarodowy Kongres Radioamatorów uznaje Esperanto za oficjalny język swego związku. Ci, których idee tak zbliżone są do wzniosłych haseł esperanckich, którzy przez swój wynalazek zniweczyli tysiące kilometrów dla lotu myśli ludzkiej, znaleźli się wobec przykrego problemu, w jaki sposób porozumieją się z wielomilionowemi rzeszami świata, mówiącemi przeogromną liczbą języków i narzeczy. Ale ci znaleźli wyjście: zwrócili się do Esperanta. Jeszcze dużo czasu upłynie zanim radio-amatorzy będą mogli porozumieć się swobodnie z całym światem, aleć są już na drodze, prowadzącej do celu.

Co jak co, ale nauka, ten zbiorowy produkt myśli ludz-

kiej, chyba najbardziej potrzebuje języka międzynarodowego. Przecież hańbą jest naszego świata naukowego, jeśli, mając żyjący język światowy, pozwala na wydawanie przeglądu matematycznego, redagowanego w czterech językach. *W czterech językach!*, I pomyśleć tylko ile tu czasu, ile energii się marnuje.

Pierwszy krok na polu uznania Esperanta przez naukę, zrobiła technika. Niedawno odbyty Międzynarodowy Kongres prasy technicznej, tej wyrazicielki nowych zdobyczy w dziedzinie techniki, uznał Esperanto za oficjalny język swych przyszłych kongresów, narazie obok innych języków oraz polecił przeglądom technicznym używanie tego języka do streszczeń artykułów i rozpraw.

Za prasą pójdzie niewątpliwie całe piśmiennictwo techniczne i dlatego ostatnie postanowienie posiada szczególny walor dla nas, Polaków. Literatura bowiem techniczna w języku polskim jest nader uboga — nie posiadamy w niektórych działach odpowiednich podręczników. Może przyszłe pokolenie nie będzie potrzebowało uciekać się do dzieł w językach obcych, mając przekłady czy oryginały esperanckie.

Szereg innych instytucji, z których wymienię tylko kilka, przyjęło Esperanto lub uznało za swój język oficjalny.

A więc Międzynarodowy Kongres „Trade Unions” zdecydował używać Esperanta w stosunkach z zagranicą. Jeśli zważymy, że wymieniona organizacja liczy 4 miliony członków, musimy fakt ostatni zaliczyć do rzędu może najważniejszych.

Dalej Kongres Międzynarodowy spirytystów uznał Esperanto za oficjalny język swych kongresów i zdecydował używać go już podczas najbliższego międzynarodowego kongresu.

Szereg innych faktów światowej miary, o których donosi stale nasz „Miesiąc esperancki”, pomijam.

Cóż znaczą teoretyczne dociekania „uczonych” na temat: „Czy wogóle językiem sztucznym można się porozumieć”, wobec faktów wskazanych?

Liczba przeciwników Esperanta znacznie już zmalała, ale jeśli są jeszcze tacy, to życie z drwiącym uśmiechem przejdzie obok nich, zatopionych, w swych gabinetowych, nic nie mających z niem wspólnego, dociekaniach.

Mieczysław Trochimowski.

Każdy nowy abonent „E. P.”, to krok
naprzód naszej sprawy w Polsce.

Władysław Stanisław Reymont.

Apenaŭ mallaŭtigis la sonoriloj de l' funebro, apenaŭ trachis la malgajo post la morto de nia eminenta Żeromski, kiam nia literaturo ricevis novan frapon kaj denove kovrigis per granda, profunda funebro.

Mortis WŁADYSŁAW REYMONT kaj la sciigo trakis la tutan mondon, nian tutan teron mizeran, ĉar granda estas la sufero, profunda la doloro, tro forta la bato por la pola kaj tutmonda literaturo.

Władysław Reymont mortis kaj funebras ankaŭ kun ni — kiel malofta okazol — la popolo, la simpla kampulo el sub la pola tegmento pajla kaj la vilaĝo, la pola vilaĝo, kaj la kampoj, la ebenaj kampoj de nia patrujoj!

Ĉar kiu pleje komprenis ilin, kiu pli funde enprofundiĝis en ilin kaj kiu scipovis kiel li jen ĝoji kaj jen malĝoji kaj suferi kun ili!

Li naskiĝis la 6 majo 1867 en la vilaĝo Kobile Wielkie en la tiama Piotrkowska gubernio.

Li ne lernis la skrib-arton, li jam naskiĝis bona rakontisto. Lia sola lernejo estis la vivo mem. Forlasinte jam fine la gepatran hejmon li vojaĝis dum kelkaj jaroj kun iu trupo de provincaj artistoj. Sed ne laŭroj lin atendis nur mizero kaj tial li forlasas la trupon kaj revenas en la gepatran hejmon. Post kalkaj klopodoj li akiras postenon de fervoj-oficisto kun la salajro de — dek rubloj monate!

Kaj la sorto ĵetas lin en la vilaĝajn regionojn preskaŭ senhomajn, for de la urba kulturo; tie li ekkonas la vivon de la vilaĝanoj en la kampoj vastaj kaj senlimaj ebenaĵoj, de Polujo, tie li observadas kaj subrigardas la naturon, la belan naturon de la pola vilaĝo.

Kaj la dekjara vagado donis al li tiom da impresoj, tiom da ĝuo kaj amo por la naturo, la vilaĝo kaj la kampulo, ke li nepre devegis skribi, krei.

Kaj tuj post sia plej unua momento de verkado Reymont montris talenton tiom sinceran, tiom memvolan kaj tiom spontan, ke li post nur 5 jaroj atingis la reputacion de la unuaranga literaturisto.

Se en ĉiuj fakoj de l' belartoj, de la penso kaj de la scienco la pola genio rezistis kaj kontraŭstaris al la maljusta divido, al la brutala perforto, al la kaŝa sennaciigo kaj al la plej kruelaj persekutoj, tio nur dank' al siaj grandaj poetoj kaj verkistoj, kiuj subtenis la malfortiĝintan spiriton de la inteligentularo.

Kaj Reymont nepre apartenas al unu el la unuaj inter ili kaj estas li, kiu kuraĝis montri, ke en la vilaĝo estas forto nia, ke tie estas la neelĉerpebla fonto, kien ni devas

la manojn etendi. ke devo nia estas alproksimiĝi al la vilaĝo al niaj kampoj.

Kaj la granda amo al sia popolo, la granda amo inspiris lin al la verko „*Kampanoj*“. al tiu majstra verko, kie la aŭtoro leviĝas ĝis sia plej alta, plej lasta fazo de sia arto.

Kaj apenaŭ unu jaro pasas de post kiam li estis ricevinta la Nobelpremion, kaj rekonita de la tuta mondo.

Kaj ĝin li juste meritis, ĉar ŝajne kaj vere ne nur nia literaturo, la pola, sed ankaŭ la fremdaj literaturoj ne havas verkon pli grandan, pli bonan, kiu tiom ĝisfunde kaj plene, tiom forte kaj klare priskribus kaj pentrus la kampulon kaj la vilaĝon kun ĝiaj vivo kaj moro ĝis la plej profunda, plej delikata parteto. Neniu alia verko en la tutmonda literaturo prezentas tiom plenan verkon de la vilaĝa vivo, neniu pli enpenetris en la vivon de la kampo, neniu pentris pli bele, pli reale, pli vere la vilaĝon dum ĉiuj tempoj, dum ĉiu sezono, dum ĉiu ajn ebla okazintaĵo.

Kaj la popolo — kiel malofta okazol — ne forgesis sian Majstron dum lia meritoplena, honesta kaj ekzemplinda vivo kaj dankemaj al la granda artisto de ilia lingvo, al la granda poeto de ilia vilaĝo, al ilia patro, kiu suferis kaj ĝojs kun ili, — ili alkuris el ĉiuj anguloj de la lando al *Wierzchosławice*, kie la verkisto pasis sian tempon, por esprimi al li sian adoron, por manifesti kun sia elementa forto sian estimon, profundan respekton kaj la amon al sia amata verkisto.

Al la verkisto, kiu — kiel neniu ĝis nun kuraĝis ĉerpi el ilia lingvo, el la lingvo de la vilaĝo, por tiom plenartisma verko kaj kiu scipovis ĝin tiel mirinde uzi en ĝia tuta bel-eco kaj kerneco, en tuta ĝia freŝeco. Kaj en la manoj de tiu skulptisto, ĝi fariĝis tiom potenca, tiom forta, tiom originala, tiom viva, ke ekmiris la lando, kiu ĝin trovadis nur lingvo kruda kaj senkristala.

Kaj Reymont pentris, ne nur la vilaĝon kaj la vivon de l' kampano.

Li ankaŭ bone komprenis kaj per sia sentema animo trapenetris la vivon de l' urbo kun ĝiaj pasio, revo kaj imago, kun ĝia senĉesa peno kaj laboro kaj la febra postkuro al la mono, kun ĝia brutala, senindulga batalo por la vivrajto kaj kun ĝia senmoraleco.

Kaj la pola Manchester, Łódź, estis la agadokampo en lia verko „*Lo promesita tero*“, kie lia talento montriĝis kiel tiu de la plej bona impresioniste realista pentristo.

Kaj la same fortan, realistan kapablon, kiun li montris en liaj nuntempaj verkaĵoj, li ankaŭ ĝin admirinde uzis en la grandioza trilogio „*Jaro 1794*“, kie li kun nepriskribebbla majstreco respegulis la animon kaj la historion de l' falanta Polujo.

Tion, kion li kreis, li faris kaj verkis unuflanke sub

impulso de lia scivolemo kaj observemo, kaj duaflanke sub influo de lia revemo.

La unua montris en li bonan observanton, realiston, redonintan ĉiun plej etan detalon el la vivo, el la observaĵo, kiaj ili estis, la dua malkaŝis al ni la poeton, kiu sub influo de sia animo, de siaj revoj, serĉas pli belan, pli altan formon.

La fortostreĉo kunigas en sia verkado la ambaŭ faktorojn en unu potencon, tio estis la individua trajto de lia talento.

* * *

Kaj la 5. decembro kruela morto forrabis lin en la momento de lia plej forte disvolviginta talento, en la momento, kiam li antaŭ preparis novan planon por siaj verkoj skribotaj kaj kiam li povis al nia literaturo donaci ankoraŭ pluajn ĉefverkojn.

Kaj plenumiĝis lia lasta deziro: oni enterigis lin en simpla ĉerko ligna, en de li tiom amata tero.

S. Grenkamp-Kornfeld.

P. S.

La verkoj de Reymont estas tro multenombraj, ke mi citu ĉiujn, la plej gravaj estas: „Komediantino“ (1896), „Fermentoj“ (1897), „La promesita tero“ (1898), „Lili“ (1899), „En la aŭtuna nokto“ (1900), la majstraj „Kampanoj“ (4 volumoj*) (1904-1906), „En la postaj jaroj“, „Vampiro“, „Ave Patria“, „Jaro 1794“. En Esperanto aperis: „Ave Patria“, „En fumejo de l' opio“, „El la konstituciaj tagoj“, ĉiuj tradukitaj de d-ro Zamenhof. Kampanoj estas tradukataj de prof. Kronenberg.

Pri la esperanta gazetara lingvo.

Se ni iom kritike legas niajn gazetojn, ni rimarkas bedaŭrindan fakton: la lingvo de la esp. gazetoj, estas tro ofte tre mankhava, mi kuraĝas aserti: erarplena. Ofte venas en mian kapon la turmenta ideo, ke koncerne lingvan korekton iu ajn el provincaj popolgazetoj naciaj superas eĉ la plej bonajn esp. revuojn.

Vi ne kredas? Sed ja tre facile estas ekkompreni la verecon de mia aserto.

Ĉiuj aliaj lingvoj (kvankam, kaj eble eĉ ĝuste pro tio, ke ili estas tiel malfacilaj, ke kun fiero ni ŝatas komparadi ilin laŭ la ellernebleco kun nia facila Esperanto) estas bonege prilaboritaj en dikaj, fakece verkitaj libroj, instruataj en multegaj kaj multgradaj lernejoj al milmiloj da ĝiaj uzantoj.

*) Kiu ricevis la premion de Nobel.

ofte korektataj kaj unuecigataj de siaj fakaj Akademioj. Homo, kiu en Polujo ne scias korekte skribi pole, ne povas ricevi iunajn postenon, nek akiri iun-ajn sukceson en la vivo, ĉu pro tio, ke la registaraj organoj ne akceptos lian ekz. petskribon pri havigo de koncesio, ĉu pro tio, ke oni lin bojkotas societe kiel nepleninstruiton. Unuvorte, en ĉiuj lingvoj lingva perfekteco formas la „alphon kaj omegon“ de la plej eta instrueco de aktiva socianon.

Kiel alie estas ĉe ni! Ĉe ni eĉ artikoloj en gazetoj rajtas esti skribataj de homoj, kiuj ne scias korekte uzi la lingvon de sia gazeto.

La kaŭzo de tiu bedaŭrinda stato estas facile eltrovebla: ni havas nek registaron, nek lernejojn, la unuan, kiu postulas korektecon, la duajn, kiuj ĝin instruas.

Oni povas antaŭvidi, ke iam, kiam E. estos oficialigita, ĉiuj registaroj, al kiuj oni turnos la diversajn skribaĵojn en E., postulos, ke la skribata esp. lingvo estu korekta, ankaŭ estos fondataj instruejoj de Esperanto, aliaj ol niaj nunaj 6-semajnaj „rapidkursoj“. Sed la tempo, kiam E. estos oficialigita, estas iom malproksima, malgraŭ la asertoj de kelkaj optimistoj, kiuj profetas al ni, ke „post 1—2 jaroj E. estas certe oficialigota“.

Tiu tempo do estas eble iom malproksima. Sed eĉ se

Sur Mrgeno

Zamenhofa tago.

15-an de decembro la esperantistaro en Warszawa festis Naskiĝan Tagon de D-ro L. L. Zamenhof. La vesperon organizis, kiel kutime, Rondo Konkordo kaj invitis ĉiajn societojn por ĝin partopreni.

Antaŭ la oficiala malfermo s-ro Bronstein deklamas versojon, dediĉitan al honoro de la Majstro. Poste je la nomo de l'estraro li invitas kiel prezidanton D-ron Leon Zamenhof.

La prezidinto per kelkaj vortoj skizas la laboreman vivon de nia Majstro kaj memorigas, ke ni kunvenas en estinta loĝejo de l'kreinto de Esperanto

(Dzika str. 9). Tamen oferante kelke da vortoj por la pollanda movado, la altestimata kaj multeŝatata Prezidinto craris, se li diris: „en Pollando esperantistoj ekzistas nur sur papero“. Por konvinkiĝi pri la craro oni povas nur trarigardi la pollandan kronikon en „Pola Esperantisto“, tiun modestan esprimon de niaj laboroj kaj sukcesoj. Nia movado ne haltiĝas, kontraŭe ĝi ĉiam kaj ĉiam progresas, ĉiam venas novaj adeptoj de nia afero, ĉiam estas starigataj novaj grupoj de P. E. A.

Sekve prenas la voĉon tre simpata plej juna filino de la Majstro, f-ino Lidja Zamenhof. Ŝi deklamas kortuŝe kaj kun

efektive ni „starus antaŭ“ la oficialigo de E., ni ne malpli forte devus zorgi pri la korekteco de nia gazetara esperantlingvo.

Ĉar la gazetaro formas en Esperantujo la Ĉefan Placon la „forumon“, kiel tian havis la antikvaj Romanoj, ĝin trafluas la tuta esperanta vivo. La gazetaro ja tial estas la preskaŭ sola medio, en kiu okazas ĉiuj evoluigoj de nia esperanta lingvo*.

Kaj eĉ post sia oficialigo Esp. ne fariĝos alia, ol ĝi estos evoluinta ĝis tiam, ĉar ŝajnas evidenta, ke ĝi ne estos pli frue oficiale rekonita, ol kiam ĝi estos plene kaj ĉiuflanke elkreskinta. La oficiala mondo verŝajne ja nur tiam „akceptos“ Esperanton, kiam ĝi ne plu bezonos, ke oni ĝin akceptu, ĉar ĝi estos jam fakte ĉie uzata inter la nacioj.

Sed kie ni serĉu la kaŭzon de la malbono? Ĉu eble E. mem estas kulpa? Ĉu kulpaj estas la redaktantoj? La pluajn prikonsiderojn mi lasas al unu el sekvontaj numeroj de la gazeto,

Leo Turno L. K.

*) Jen la kaŭzo, kial mi parolas speciale pri la gazetaro kaj silentas pri la cetera esp. literaturo.

videble profunda kompreno versajon „La vojo“.

S-ino Cense parolas pri rezultoj de la granda verko de Zamenhof. Menciindaj estas la vortoj, kiujn ŝi oferis por skizi, kion alportis Esperanto por nia patrujo, sed mi ne povas tion fari pro manko de spaco.

Poste s-ro Koss legas pollingvan prelegon pri, kiel li mem tion opiniis, filozofio de Esperanto-movado. La prelego, en kiu la parolinto montris veran talenton, estis tre interesa, tamen la preleginto ne povis sin deteni de eldiro de kelkaj kritikemaj frazoj. Kritiki povas ĉia, eĉ kritiko estas necesa kaj bezona, kritiko, sed ne mencioj, direktitaj kontraŭ

iaj esperantistaj grupigoj, sed ne tate privataj. personaj aferoj. Mi ne volas ĉi tion konsideri kiel atakon, atendantan kontraŭbatalon. La parolinto ŝajne ne bone komprenas kondiĉojn de la lando, en kiu li loĝas.

Pli da agoj, sinjoro Koss, malpli da vortoj kaj la afero fartos pli bone!

La konvenon finas tralego de originale verkita novelo de s-ino Lidja Zamenhof kaj deklamo de s-o Bronstein.

La ĉeestintoj disiras kun koroj premitaj, ĉar tia, por kiu estis destinita la vespero, ne estas jam inter ni.

M. Trochimowski.

Niaj Kongresaj Intervuoj

(De nia tre fidinda kunlaboranto).

— Ni ĉiaj bone scias, ke la Redakcio de „Pola Esperantisto“ estas ĉiam plena da plej aktualaj aktualajoj, do mi tate ne estis mirigita, kiam nia Ĉefredaktoro alvokis min kaj ordontone diris al mi, ke mi taj devas vojaĝi tre malproksimen — al nia Pollanda Siberio.

Ĉar mi estas homo disciplinema kaj, krom tio, kontenta ke oni ne sendas min al Norda Poluso, mi taj konsentis kaj demandis — kien, nome, mi devas vojaĝi.

— Vi veturos Wilnon, ĉar ĝi estas arbo de nia Sepa Pola Kongreso kaj vi interwew'os Lokan Kongresan Komitaton — diris al mi la severa Redaktoro.

Mi klinis la kapon, asekuris mion vivon kaj preninte du vintro-peltojn taj vojaĝis per triaklasa luks-ekspreso al tia enigma, nekonata arbo.

Kiam matene mi atingis ĝin, mi konstatis, ke ĝi estas tate en ordo (krom la Delegito de U. E. A.) kaj mi persone nenion havas kontraŭ ĝi, kiel kongresarbo. Se Vi demandos min, kiel ĝi sin prezentas, mi respondos per konata orienta anekdoto,

Una kaŭkazano klarigis al sia kolego — kio estas, ni diru, abrikoto.

— Ĉu Vi konas melonon? demandis li — Jes? Do Wilno estas tate malsimila!

Se mi aldonos (tate sekretel), ke en Wilno mi havis unu feliĉan romanseton kun simpatia vilnanino — vi komprenos, ke mi povas nur varme rekomendi Wilnon kiel kongresurbon.

Restas nur interwew'oj. Tio estis la plej malfacila afero. Kiel estas ĉie konate-Varsovianoj neniam havas liberan tempon. Vilnanoj deziras imiti varsovianojn kaj mi malfacile kaptis komitatanojn de l' Sepa.

S-ro Profesoro Maszyński, Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, estas tiel okupita per sia Kontraŭ-Gasa laboro, ke inter tiaj gasoj kaj gasetoj estas tute nekaptebla kaj mi, kun granda risko por mia vivo, eksciis ĉe profesora laboratorejo, ke S-ro Maszyński estas malnova Esperantisto de 1906 jaro kaj estinta kelkjara Prezidanto de Esperanta Grupo en Tartu en Estonio.

S-ron Prokuroron Roman Sakowicz, Ĝeneralan Sekretarion de nia Sepa, mi postkuris longtempe en koridoroj de Juĝeja Domo, kaptante lin inter una akuzado (atentu, sinjoro kompostisto — ne uzu crare literon „ŝ“ anstataŭ „z“) kaj alia. Li rigardis min tiel severe, ke mi pensis esti taj malli-

berigita, sed esperantaj sonoj serenigis la minacplenan fronton de nia samideano, kia jam de 1904 jaro portas verdan ste-
lon sur sia brasto.

S-ro Wacław Jankowski, Kasisto de l' kongreso, — ofic-
okapita matene kaj vespere, estas kiel profesoro de gimnazio
tute nekaptebla, sed de liaj disĉiploj mi eksciis ke li estas tre
bonkora malnova esperantisto kaj simpatia homo, do mi povas
tre varme rekomendi lin al niaj belaj samideaninoj.

Resumante la enhavon de miaj interwew'oj kun tiuj
L. K. K.-anoj mi povas diri jenon:

Wilna samideanaro, ne tro granda, sed esperantplena,
esperas, ke gesamideanoj venontaj al Pola Kongreso en
Wilno, helpos al ili vekti la intereson por Esperanto ĉe la
Wilna publiko kaj antaŭen paŝi la dormantan movadon. Do,
ĉia alveninta en Majo 1926 samideano devas kompreni, ke
li helpas al afero duoble: kiel kongresano kaj kiel propagand-
isto — jam per sia ĉeestado. Do la nombro de kongresanoj
devas esti sufiĉe impresiga kaj estus la plej ekzemplinda, se
Vi, kara leganto, prenas, dek zloty kaj sendas ilin taj, kiel
helpmembran kongrespagon.

Ĉu Vi ne volas esperantigi la urbon, ĉe kies finiĝo estas
esperantema?
S. A. Kowicz.

S c i e n c o .

Memmortigado inter bestoj.

Maurice Barrés, konata
franca verkisto, tre amanta
bestojn, rakontis historion pri
angora katino, kiu li posedis.
Kiam anufoje li ekkriis al ĝi,
estante tre nervigita, la besteto
forkuris kaj elsaltis tra la fene-
stro, memmortigante. Barrés ne
dubis, ke la bela katino faris
tion kónscie.

Simila kaj ankaŭ kortuŝiga
akcidento okazis en Rocester.
Una sinjoro havis hundon, kiu
ŝajne estis rabia. Tial oni en-
fermis ĝin aparte por observ-
ado. La besto estis tre malĝoja,
sed oni pensis, ke tio estas
kaŭzita de la malsano. Unufoje
oni liberigis la hundon, kiu iris
al la domo de sia sinjora ami-
ko kaj tie laŭte bojis, sed oni
ne malfermis la pordon por la

mizera besto. Tiam ĝi, sentan-
te sin tate soleca, iris al rivero
kaj en ĝi droniĝis.

Sed la plej interesan ekzem-
plon de la memmortigado inter
bestoj ni renkontas ĉe skorpioj.
Oni povas konvinkiĝi pri tio
per simpla eksperimento; oni
devas ĉirkaŭi la beston per
ligneroj aŭ pajleroj, kaj poste,
bruligante la barilon, oni mal-
permesas al ĝi forkuri. La he-
roa skorpio, ne volante esti
bruligita de flamoj, tarnas sian
pikilon kontraŭ sin kaj senhez-
ite enprofundigas ĝin en sian
korpon.

Oni povas citi pli multe da
ekzemploj, sed ili ĉiaj ne pr-
vas certe ĉu tio temas pri
plenkonscia memmortigado. Ti-
al la psikologio de niaj paren-
coj — bestoj estos longe por
ni enigmo.

Ruch esperancki w Polsce.

Pola esperantista movado.

Warszawa.

Polskie Tow. Esperantystów zorganizowało wyższy kurs języka pod kierownictwem p. M. Kausa. Kurs odbywa się raz na tydzień w lokalu Towarzystwa. Zapisanych jest 8-iu esperantystów. Jednocześnie T-wo prowadzi w dalszym ciągu dwa kursy dla początkujących, na które ogółem uczęszcza 34 os.

— Dnia 19-XII odbyło się drugie posiedzenie Centralnego Zarządu P. T. E. Na zebraniu był obecny prezes oddziału w Koluszkach, p. St. Sudelik.

Poznań.

Przy miejscowym oddziale P. T. E. rozpoczął się kurs Esperanta, prowadzony przez p. T. Kapelę. 16-tu uczestników.

Lublin.

P. T. E. oddział w Lublinie donosi:

Dn. 16-go grudnia w lokalu P. T. E. odbyło się zebranie celem uczczenia 66-ej rocznicy urodzin D-ra L. L. Zamenhofa. Na uroczystość tę przybyli oprócz esperantystów liczni sympatycy naszego języka.

Na program złożyły się: odczyt p. d-ra J. Mędrkiewicza o utworach Zamenhofa, referat p. Cz. Pruskiego: „Podstawa Esperanta“, oraz bogata część koncertowa. Wieczór, z którego uczestnicy wynieśli jak najlepsze wrażenie, zakończył się odśpiewaniem hymnu „La Espero“.

Warszawa.

Pola Esperanto Asocio organizis superan esperantan kurson, gvidatan de s-ro M. Kaus. La kurso okazas ĉiusemajne en sidejo de la Asocio. La kurson partoprenas 8 esperantistoj. Samtempe funkcias du kursoj por komencantoj, partoprenas ĝin 34 personoj.

— La 19-XII okazis dua kunvido de Centra Estraro de P. E. A. La kunveno ĉeestis la prezidanto de grupo en Koluszki, s-ro St. Sudelik.

Poznań.

Ĉe la loka grupo de P. E. A. komenciĝis esperanta kurso, gvidata de s-ro T. Kapela, 16 partoprenantoj.

Lublin.

P. E. A. grupo en Lublin komunikas:

La 16-an de decembro, en la ejo de P. E. A. okazis kunveno por honorigi la 66-an jardat-revenon de naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. La solenan kunvenon ĉeestis krom esperantistoj ankaŭ multaj simpatuloj de nia lingvo.

Laŭ la programo de l'vespero d-ro J. Mędrkiewicz parolis pri la verkaro de Zamenhof, s-ro Cz. Pruski havis lecion je la temo „La bazo de esperanto“ — post kio sekvis koncerta parto. Vespero, kiu forte impresigis la ĉeestantojn, finiĝis per kanto de nia himno „La Espero“.

— Obydwa miejscowe dzienniki „Głos Lubelski“ i „Ziemia Lubelska“ stale podają wiadomości o ruchu esperanckim.

— Oddział lubelski P. T. E. prowadzi kurs dla uczniów gimnazjalnych. Wykłada p. kapitan Lelek-Sowa.

Radom.

Miejscowy oddział P. T. E. zorganizował kurs języka Esp. Uczęszcza 18 osób.

Kraków.

Dn. 13-XII odbył się w uniwersytecie odczyt p. M. Ziomka p. t. „Esperanto i jego obecne znaczenie“.

Królewska Huta.

Dn. 17-XII miejscowe „Koło Esperantystów“ wraz z katowickim Towarzystwem przyjaciół Esperanta. urządziło wieczór z okazji 66-ej rocznicy urodzin Mistrza. Obecnych było 60 osób.

Sosnowlec.

Na otwarty kurs języka Esp. uczęszcza 79 osób, przeważnie ze sfer nauczycielskich.

— P. R. Czechowski wygłosił tutaj odczyt p. t. „Esperanto a szkoła“.

— Ambaŭ lokaj ĵurnalo „Głos Lubelski“ kaj „Ziemia Lubelska“ konstante raportadas pri esperanta movado.

— La Lublina grupo de P. E. A. gvidas kurson por gimnazianoj. Instruas s-ro kapitano Lelek-Sowa.

Radom.

Loka grupo de P. E. A. aranĝis esperantan kurson. Partoprenas ĝin 18 personoj.

Kraków.

La 13-XII okazis en universitato prelego de s-ro M. Ziomek j. t. „Esperanto kaj ĝia graveco nuntempa“.

Królewska Huta.

La 17-XII la loka „Esp. Rondo“ kune kun la „Asocio de Esp. Amikoj“ en Katowice aranĝis vesperon, okaze de 66-a jardat-revenon de naskiĝo de nia Majstro.

Ĉeestis 60 personoj.

Sosnowlec.

Ĝus malfermitan esp. kurson partoprenas 79 personoj, precipe el instruista medio.

— S-ro R. Czechowski faris prelegon j. t. „Esperanto kaj lernejo“.

Bibliografio.

Ni recenzas nur pri verkoj duope sendita. al ni. La unuope senditajn ni citas laŭ titoloj

Karel Čapek. *Rossumis Universal Robots*. (Rosumaj Universal Robotoj). Tiu dramo de ĉeĥa aŭtoro jam multe brugiĝis en tuta Eŭropo — Libro 104 p., form. 15×21. Pr. 2 svis. fr. ĉe Ant. Kundela Novosady, Olomouc. La traduko de la Moraviaj Esp. pioniroj estas lere farita, la verko facile leg-

ebla. Eble ni diru nur, ke „nenial“ estas iom arĥaika, kaj estas de la Majstro mem forlasita pro manko de sufiĉa esprimo de kaŭzoj. Same „darfas“ tro malmulte diferenciĝas de nia honesta „devas“.

Respondoj al kontraŭreligiaj paroloj, de M-ro de Segur. Laŭ la germana traduko de P. H. Müller esperantigis D-ro Adolf Halbedl. Prespermesita de la ordinariato en Graz. Jen verko inda kaj propagande valora por la katolikaj Esperantistoj, certe legota ankaŭ kun intereso de aliaj Esperantistoj. La traduko estas zorge kaj bonstile skribita. Stranga eco de Esperanto: El la germana traduko, en Esperanto, oni retrovas praskaŭ la originalon francan.

La respondojn antaŭas biografieto de la fama franca Episkopo kaj klarigoj de la tradukinto. — Libro 210 p., form. 12×19, broŝurita. Pr. 5 aŭstriaĵ sil. Verlagsbuchhandlung „Styria“, Graz.

Friedebert Tuglas. *Kvin noveloj*. — El estona lingvo trad. Henriko Seppik. — Plezure certe, la Esperantistoj konatiĝos, pere de tiuj noveloj, kun unu el la plej famaj estonaj verkistoj: Potenca imago, lerta pentristo de la lando kreita. La libro povus surporti, kiel devizon: Ni vivu kun homoj, se ni volas ĝui homan feliĉon. La stilo de la tradukisto estas bona, la legado de la libro, agrabla. La vorto „morna“ plurfoje uzita, ne ĉiam taŭgas. La vortoj „ununura, unutona, malĝoja“ ne difektus la stilon, cetere eksterordinare flua kaj korekta. Libro 159 p., form. 14×21, kun la portreto de la aŭtoro (ne de la trakinto!) Eldonejo; „Tamverk, Haapsala, Estonujo“ — Esp. fako.

Oriente Nr. 1. Monata ilustrita revuo en Esperanto. Vasta entrepreno: Konigi orienton per Esperanto. 109 paĝoj, form. 19×25. Enhavas fakojn pri: historio, socio, etnografio, literaturo, biografio, bibliografio, komerco, pedagogio, el la sekvantaj landoj: Ĥinujo, Japanujo, Koreo, Formoso, Siberio, Mongolujo kaj Tibeto. — Preskaŭ ĉiuj artikoloj estas verkitaj de fama rusa orientalista, P. V. Ŝkurkin, kaj trad. Esp. de s-ro I. Seriŝev. Esperantistoj certigis la aperon de 3 N-oj, kiel provon. La eldonanto atendas de la Esp. la ebligon de la daŭrigo. Abono 12 yen (5 dolarojn). Esp. Eldona k-io „Oriente“, Ĥarbin, Manĝurujo, Novij-Gorod, P. O. Box 35.

La Kataluna popolkanto. Traduko de Joan Amades kaj Jaume Grau Casas. La tradukoj estas premiitaj dum la floraj ludoj. Libro 29 paĝa, form. 15×21 cm.

En poeziplena antaŭparolo la aŭtoroj prezentas per trafaj vortoj la valoron kaj signifon de la popolkantoj ĝenerale, kaj de la Katalunaj speciale. La legonto multe gajnos morale legante tiujn prezentajn vortojn, ĉar multaj

personoj ne sufiĉe atentigas tion. La kantojn akompanas la muziko por ebligi la kantadon en muzikemaj rondoj.

Ĉiam kun la sama celo, ni atentigos pri la influo de la nacia lingvo en la esprimmaniero, ĉe la enkondukaj vortoj. P. 1 l. 1: *estas la popolkanto, kiu havas estas romanismo* (la popolkanto havas ..) P. 1, l. 4 de malsupre: *enradikiĝis en la spiriton*, akuzativo post verbo netransitiva. Paĝ. 7 l. 7 de malsupre: *plendas la turmentajn*. *Plendi* estas netransitiva: *tie ĉi kompati estas necesa*. Ni trovis ankaŭ „foje“ uzatan anstataŭ: *iafoje, iam aŭ jen... jen*.

Prezo 1 peseto, ĉe la aŭtoro: J. Grau Casas, Claris 72: Barcelona. Resume, estus dezirinde, ke pri ĉiuj verkoj aperantaj en Esperanto oni povu fari nur tiajn rimarkojn, kiajn ni faris pri la recenzata libreto. Ni konsilas al ĉiuj legi ĝin, kaj kanti la poeziajn, vere sudajn kantojn de la Pireneoj.

Postmorta vivo. Eltiraĵo el la verkaro de Japana spirita verkisto: Vanisaburo Deguti. „Rakontoj el Spirita Mondo“, tradukis Tadakacu Juri. 11 paĝa broŝureto. Eldono de „Oomoto“ Ajabe-Kioto-fu. Japonujo.

Ĝ. F. C.

Leo Turno, Kompletny podręcznik języka międzynarodowego Esperanto.

Wydanie drugie poprawione. Kraków 1926. Nakładem Towarzystwa Esperanto. Adres: Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37. Cena: 1.25 zł. (niewskazana).

Oto ukazało się drugie wydanie tego doskonałego podręcznika. Uczeń znajdzie w nim, prócz reguł gramatycznych, bogaty i dobrze ułożony materiał do tłumaczenia.

Na specjalną uwagę zasługuje język prawdziwie Zamenhofowski.

Z pośród istniejących podręczników „Kompletny podręcznik języka Esperanto“ jest niewątpliwie najlepszy, dlatego możemy go gorąco polecić wszystkim kierownikom kursów, korzystać z niego mogą zarówno ludzie wykształceni, jak i ci, dla których Esperanto jest jedynym językiem „obcym“.

„*Informilo por Junaj Esperantistoj*“. Eldonis Esperantista Junularo, A. Neupert. Adr.: Leipzig-Moeckern, Wedellstr. 17. Prezo: 0.25 germ. mk.

La informilo temas pri informoj interesantaj la junularon. La Libreto konsistas el du partoj: junularaj aferoj kaj esperantismo. La malalta prezo ebligas al niaj junuloj havigi al si tiun rekomendindan verketon.

A. Mir.

Konkurs.

En ĉi tiu numero ni anoncas konkurson por ĉiuj niaj legantoj (ne nur abonantoj). La partoprenantoj estas petataj traduki la malsupre presitan polan tekston kaj sendi ĝin al nia Redakcio, aldonante sur la koverto vorton „Konkurso“. Lasta termino de la konkurso estas 30-II-1926.

Por la plej bone tradakontoj personoj ni destinas du premiojn:

1) „Sinjoro Tadeo“ de A. Mickiewicz, trad. de A. Grabowski.

2) Senpaga abono de „Pola Esperantisto“, en 1926.

*

„Oddawna zauważyłem, że dla obyczajów, dobrze jest iść niekiedy za mniemaniami, o których wiemy, że są bardzo niepewne, tak jak gdyby były niewątpliwe; ale ponieważ wówczas pragnąłem się poświęcić jeno szukaniu prawdy, sądziłem, iż trzeba mi począć sobie wręcz przeciwnie, i odrzucić jako bezwarunkowo fałszywe wszystko to, w czem bym znalazł najmniejszą wątpliwość, aby się przekonać, czy nie zostanie potem w mojem wierzeniu coś, coby było zupełnie niewątpliwe. Tak, z przyczyny, iż zmysły zwodzą nas niekiedy, przyjąłem, że żadna rzecz nie

jest taka, jak one ją przedstawiają. Ponieważ istnieją ludzie, którzy się mylą w rozmowaniu nawet odnośnie do najprostszych przedmiotów geometrii i wpadają w mylne wnioski, pomyślałem, iż ja jestem podległy błędom równie jak każdy inny i odrzuciłem jako fałszywe wszystkie racje, które przyjąłem niegdyś jako dowiedzione. Wreszcie, uważając, że wszystkie te same myśli, które mamy na jawie, mogą nam przychodzić wówczas, gdy śpimy, zasię wówczas żadna z nich nie jest prawdziwa, postanowiłem przyjąć, iż wszystkie rzeczy, które weszły w mój umysł, nie bardziej są prawdziwe, niż złączenia sennie. Ale równocześnie zastanowiłem się, iż podczas gdy się przypaść, że wszystko jest fałszywe, trzebaż, obym ja, który to myślę, był czemś, i uważając, iż prawda: *myślę, więc jestem*, jest tak pewna i niezłomna, że wszystkie najskrajniejsze przypuszczenie sceptyków nie są zdolne jej obalić, osądziłem, iż mogę ją przyjąć bez skrapała za pierwszą zasadę filozofji, której szukałam“.

Descartes.

**Nie zapomnij odnowić prenumeraty
na rok 1926.**

Opinie wybitnych Francuzów.

PAINLEVÉ: Język Esperanto może oddać ludzkości pierwszorzędne usługi, a mianowicie: zbliżenie się narodów, usunięcie nieporozumień międzynarodowych, gdyż łatwość porozumienia się w jednym języku spowoduje wzajemne zrozumienie się, ożywienie stosunków handlowych i wielkie zaoszczędzenie czasu, który musimy poświęcać na uczenie się trudnych języków. Rozwój Esperanta

leży w interesie całej ludzkości.

BRIAND: Z początku mówiono o języku Esperanto ze współczuciem, a esperantystów nazywano marzycielami. Ale wytrwałość idei wysunęła ją na pierwszy plan. Zaczęto z nią walczyć sarkazmem. Dzisiaj krytyka walczy z esperantem, ale już bez ironji i sarkazmu. Ataki przeciwników przybrały inną formę. Esperanto nabrało sił, by się móc bronić.

Estraro de la Akademio.

por la jaroj 1926 - 1927 - 1928
(laŭ lastaj elektoj)

Prezidanto: Prof. Th. Cart.

Vicprezidantoj: S-ro Warden
kaj D-ro Dietterle.

Direktoroj de la 8 Sekcioj:

Prof. Grosjean-Maupin.

D-ro Lippmann.

D-ro Privat.

A v i z o .

La januaro, numeron de „Pola Esperantisto“ ni sendas al ĉiuj malnovaj niaj abonantoj. Kiu ne volas plue aboni havas la moralan devon tian ĉi numeron resendi.

Samtempe ni petas la abonantojn repagi la abonon, kiel eble plej frue, ĉar al tiaj, kiaj ne repagos, ni ne sendos la februaran numeron.

Nova eltrovaĵo.

Scienculo en Charlottenburg. Karl Mäller post multaj eksperimentoj sukcesis fari oron travideblan. Li faris el oro tiel maldikan tavolon, ke estas malfacile imagi, ke iu ajn metalo povas ekzisti en tia stato — nome la tavolo estas 0.000.001 cm. dika. Pro tio la metalo fariĝis tute travidebla, kiel plej bona vitro. En la travidebla tavolo de oro scienculoj trovis nur 30 tavolojn de atomoj.

Redaktoro kaj eldonanto: Stanisław Karolczyk.

Sekretario de la Red.: Mieczysław Trochimowski.

Presejo: Fratoj Wójcikiewicz, Warszawa, Pawia 10.

Ricevitaj gazetoj:

Amerika Esperantisto (nov., decembro), Arbeiter Esperantisten № 8, Gomoto № 1, Belga Esperantisto Nr. 8-9, Informoj Nr. 11-12, Literatura Mondo Nr. 10, Konkordo Nr. 12, Esperanto (rumana) Nr. 9, Ridanta Esperantisto Nr. 3, 4, Vegetarano Nr. 4, Bulgara Esperantisto Nr. 8, Germana Esperantisto Nr. 12 (358), 1 (359), Espero Katolika Nr. 13, La Revuo Orienta Nr. № 11, Revista del Ateneo № 17, Heroldo de Esp. № 99, 100, International Language - 12, Bulteno de Antverpena Komitato № 12, La Socialisto № 1, Kataluna Esperantisto № 17-18, Academia pro Interlingua № 6, La Suno Hispana № 102, 103.

Nowe uzupełnione wydanie

Kompletnego podręcznika języka Esperanto

Leo Turno, członka Komitetu językowego, ukazało się już nakładem autora i jest do nabycia w cenie Zł. 1.25 za egz. Wysyła się najmniej 5 egz. Przy zamówieniu 10 — 25 egz. udziela się 25% rabatu, 25 — 80 egz. 30% rabatu, 60 — 100 egz. 33 1/3% rabatu. Wysyłkę uskutecznia się po utrzymaniu należności na P. K. O. Kraków, nr. 406.716 lub na adres:

LEOPOLD DREHER, Kraków, Starowiślna 87.

„Pola Esperantisto“


bezonas

2000 abonantojn.

Kiu varbos 5 novajn abonantojn

ricevados nian organon

senpage dum la tuta jaro.



En la jaro 1926 ĉiu grupo ali agentoj ricevas

20% da rabato


propagandante nian organon

„Pola Esperantisto“

La administracio akceptas reprezentantojn en ĉiuj lokoj de la mondo, disvastigantajn

„Pola Esperantisto“n

Varbu novajn abonantojn!



Memoru pri la adreso:

Warszawa, Widok 19.